

FEDERACIA KUNVENO EN BÉZIERS (22 IX)

Partoprenas 18 personoj, la grupoj de Béziers kaj Montpellier estas bone reprezentataj. Ĉiu sin prezentas. La prezidanto Jean Hénin (JH) bonvenigas ĉiujn, esperante, ke ĉiu akumulis dum la ferioj energion por la venontaj monatoj, ankaŭ por E^o-agado. Li senkulpigas plurajn personojn kaj sciigas, ke 4 decidis bojkoti la kunvenon. Li dankas la grupanojn de Béziers, kiuj sukcesis trovi lokon por la kunveno. La sekretario Charles Gérard-Voinçon (CG) klarigas, kial la kunveno ne povis okazi en Narbono, kiel antaŭvidite. Annick Tora proponas helpi pri tiu urbo alian fojon. Jean Gauthier (JG) petas, ke la kunveno disvolviĝu en la franca. JH opinias, ke ni devas ankaŭ praktiki E-on dum niaj kunvenoj. Fakte ni parolos grandparte en la franca, kio faciligas la interŝanĝojn, sed ĉu ni ne estas E^o-federacio?

Interkonsento pri la tagordo: A) urĝaj aferoj, B)raportoj pri la lastaj okazintaĵoj, C)projektoj, D)diversaĵoj (pluraj punktoj menciataj). Line Maurel prezidos (matene) la kunvenon kaj atribuos la parolvicon.

A) JH memorigas pri la baldaŭa SFS, artikoloj estas atendataj. Sekve de klopodoj, ni partoprenos la Eŭropan tagon de lingvoj en Montpellier, je merkredo la 26a de septembro; pluraj personoj estas kontaktitaj. Pri la kataluna kongreso (12a ĝis 14a de oktobro) informoj jam aperis en SFS, aliĝiloj estas disdonataj. Retpaĝoj pri esperanto kaj la federacio estas preparataj de Mikaelo Simon, ili estos pretaj meze de oktobro, post apero de SFS: <http://www.chez.com/esperantosf>. Ne hezitu konigi la aferon! Grupoj povos informi pri la retpaĝoj. Ni ankaŭ metos anoncojn en pluraj gazetoj: "Midi Libre" (ĉiuj departementoj), "La Gazette de Montpellier", "L'Hérault du jour", "L'Indépendant". JH rilatos kun Francis Bernard pri la publikigo.

Prelegvojaĝoj: ĵurnalista el Dagestano vizitos Francion en januaro. Béziers kandidatiĝis. Inter la grupoj, kiuj sin proponis, estos elektataj nur deko, por ke la gasto restu plurajn tagojn en ĉiu loko. Se Béziers estas elektota, eble oni aranĝos ion kun Montpellier.

B) La semajno de Sète arigis pli ol 50 personojn. Stipendioj estis petataj por du junulinoj (entute 1500 F). La materialo de la federacio estis uzata por la evento. Pluraj federacianoj partoprenis la UK de Zagreb (1700 aliĝoj). Fine de la kongreso estis anoncataj pluraj demisioj ĉe UEA. JH ankaŭ partoprenis turisman E^o-semajnon en Malto en septembro. Forumoj de asocioj: en Béziers la budo estis bone vizitata (15 nomoj rikoltitaj sed ĝis nun nur unu persono konfirmis); en Agde ni ne partoprenis; en Montpellier estis ankaŭ multaj vizitantoj. Diskuto por partopreni forumojn en aliaj urboj, sufiĉas unu esperantisto surloke, kiun ni helpas.

C) Vizito de Ge-Robineau: ni devas rezigni. Ago-tago de la 6a de oktobro (ĉiam la unuan sabaton de oktobro): ĉiu povas interveni, ĉu individue, ĉu kun la loka grupo. Staĝo pri gramatiko (kun Sro Cherpillod) estas organizota de "Réinsertion" komence de novembro. La grupo de Béziers festos la Zamenhof-tagon je sabato, la 8a de decembro kaj invitas vin partopreni. Kursoj ĉi-jaraj: estus bone menciitaj ĉiujn en SFS (la abontarifo estos 6 Eŭroj do fakte la tarifo estos iom malpli alta! 6 Eŭroj estas la normala tarifo, ne estas malpermesite pagi iom pli!). Diskuto pri la estonto de Eŭropo: la dokumentoj estos sendataj al la grupoj.

La venonta federacia kongreso okazos **sabaton, la 27an de aprilo 2002**, je la limo inter Gard kaj Hérault, ĉu en Sommières, ĉu en Boisseron (pluraj personoj prizorgos kunvensalonon, ktp). La frua dato tiel distanciĝos de la staĝo de Agde kaj de la amika semajnfino. Pri la staĝo estas nun esplorata ebleco en la ferivilaĝo EDF de Cap d'Agde. Informoj en la januara numero de SFS. Dum somero 2002, KAFE eble okazos denove sed en Katalunio; la Eŭropa kongreso disvolviĝos en Verona (Italio) fine de Aŭgusto (23-28 VIII); aliĝiloj/programoj estas jam haveblaj. (*Intertempe ni eksciis pri la okazigo de la fervojista kongreso en Port-Vendres en marto*).

D) Pri Nimo estas esperoj restarigi grupon, ni estu paciencaj! Radioelsendoj: estas minacoj nuligi la E^o-elsendojn ĉe Radio Vieno (Aŭstrio). Mado Vidal parolas pri la agado de "Fraternophonie", kiu defendas la francan lingvon. La grupo de Béziers skribis al la ministro de poŝto koncerne la eldonon de poŝtmarko pri E^o. Rebatservo: ne forgesu sendi al SFS ĉiujn gazetartikolojn pri esperanto, favorajn aŭ ne. JG insistas pri la vorto "diffusion de l'E^o", kiu ne aperas en la statutoj, eĉ se estas similsignifaj vortoj.

Fine estas legataj la leteroj de Ges. Bernard, H. Olek, G. Paing, kiuj ne venis al la kunveno kiel protesto. Se kritiko estas normala en asocio, iuj vortoj ŝokas kaj estus pli normale veni al la kunveno por diskuti kun ĉiuj. "Ne tro da formalajtoj, unue regu amikeco!", diris iu. Pri la kritikoj de faritaj decidoj, ili okazu dum la kunvenoj, ne poste. Elspezoj: unue konsulti la kasistinon kaj fakturo/atesto estu prezentata ĉiufoje. Repago de la budo por la bovéaj manifestacioj: la peto neniam estis formale prezentita. Se Mado Vidal opinias, ke esperantistoj devas sin montri ĉie, aliaj opinias la malon. La statutoj ne permesas partoprenon en ĉiaj manifestacioj. Koncerne la disvolviĝon de la kunvenoj, estas konsentite pri la prezento de tagordo (forĝisita lastfoje), tio ne forprenu tro da tempo kaj ni ne forgesu la "diversaĵan"parton. "Mastro de ceremonioj" decidis pri la parolvico. Konkrete pri la venonta kongreso: la kunveno komenciĝos je la deka horo precize por la komitatanoj, kiuj parolos maksimume duonhoron pri la tagordo (povos ĉeesti aliaj esperantistoj, sed JG petas, ke estu distingo inter komitatanoj -kies rolo estas rememorigata- kaj la aliaj esperantistoj) kaj tiam komenciĝos la ĝenerala kunveno (fiksota je 10h30 precize).

La propono de baldaŭa aparta kunveno por elekti novan estraron estas unuanime rifuzata.

Ni rendevuas ĝis la Zamenhofa tago aŭ la printempa kongreso plej malfrue.

CG + JH

(Menciindas la bonega tagmanĝo en Béziers. Nura riproĉo: la elekto estis tro granda!)

VIVO DE LA FEDERACIO**BEZIERS**

Post la somera ripozo, estas bone indiki la datojn de niaj monataj kunvenoj (sabate je 14h30) :
la 13an de oktobro, la 10an de novembro kaj la 12an de januaro .

Ne okazos la kutima kunveno en decembro, ĉar ni festos la **Zamenhof-tagon la 8an de decembro** .
 La programo ankoraŭ ne estas decidita , tamen la festo komenciĝos je la 10a horo matene . Poste : komuna manĝo kaj distra posttagmezo. Fino je ĉirkaŭ la 17a horo . *Ĉiuj -eĉ ne loĝantoj en Béziers- estas kore invititaj .*
Por la tagmanĝo, ni bezonos scii la nombron jam de la 1a de decembro .Do, konigu vian deziron kiel eble plej frue

La forumo de asocioj ("Les Associations font les Allées") okazis la 8an de septembro . Ni havis budon bone lokitan sur la Aleoj . Multaj homoj haltis; ĉu esperanto progresos ?
 Aparte ni devas danki Ges. Bernard, kiuj alportis plian materialon kaj efike helpis nin dum la tuta tago . Preskaŭ ĉiuj grupanoj ankaŭ ĉeestis kaj helpis informi . Dankon al ĉiuj .

Kursoj : Ili komenciĝis :

-unuagrada : lundon la 24an de septembro, 9 rue G. Picot, je la 18a horo kaj/aŭ,se necesas alia la 3an de oktobro je 14h30 ;
 -duagrada : vendredon la 21an de septembro, rue Picot je 14h30
 -triagrada : je la sama dato kaj sama horo kiel la duagrada, sed ĉe Maison des Associations .
 Ni deziras al ĉiuj bonan kuraĝon kaj bonan laboron .

Nia grupo invitis en Januaro 2002 Abdurhaman Junusov, kiu prelegvojaĝos tra Francio dum tuta monato . Li estas ĵurnalisto el Dagestano kaj parolos pri la riĉa historio de sia lando, pri la multlingveco tie (70 lingvoj por ĉirkaŭ miliono da loĝantoj !) , pri la mirindaj artoj kaj metioj...aŭ pri najbara Ĉeĉenio .

Leĝo 1901 pri asocioj : Je tiu okazo estis manifestacio sur la stratoj kaj ni paŝis kun banderolo . Foto (~~vide ĉi-paste~~) aperis en "Okazas" sed ne temis pri la forumo de asocioj, kiel erare indikite .

GARD-LOZERE

Nia federacio disponas nun pri "hejm-paĝaro" sur la reto por prezenti esperanton . Realigis ĝin juna Mikaelo Simon el Quissac . Bonvolu anonci anticipe viajn projektojn kaj ni volonte ĝisdatigos la liston de la eventoj en la regiono . La tekstoj estas por la ekstera publiko kaj kompreneble en la franca . Ne hezitu reklami la adreson : <http://www.chez.com/esperantosf> . Komentoj kaj sugestoj estas kompreneble bonvenaj .

Pasporta Servo : Du junaj Germaninoj haltis en pluraj lokoj de nia regiono dum oktobro . Ilia plano estas iri ĝis Santiago de Compostela , dank'al "Pasporta Servo" . Eventuale ili muzikumos survoje por gajni iom da mono . "Pasporta servo" nun havas 1161 adresojn en 80 landoj kaj ebligas senpagan gastigadon al junaj esperantistoj . Por la venonta eldono de la adreslibro la limdato estas la 1a de novembro,do bonvolu rapidi,ĉu por konfirmi vian konsenton aŭ aldoni vian adreson al la listo (Informoj ĉe SFS) . Bonan vojaĝon al simpatiaj Meral kaj Anne !

MONTPELLIER**Centre Culturel** :

Forumo de asocioj la 9an de septembro : nia budo estis bone vizitita . Dankon al tiuj, kiuj helpis .

Kunvenoj : la unua okazis la 4an de oktobro, partoprenis dekkvino da homoj . Agrabla etoso, ĉiuj parolis .

Estis decidite pri la programo de la venontaj kunvenoj :

-en novembro (la 8an ?) : ĉiu bonvolos paroli dum 5 minutoj, la temoj estas liberaj ;

-en decembro (la 6an) : pri la ĉarto de la minoritataj lingvoj ;

-en januaro : ĝenerala kunveno la dekan de januaro .

Komuna tagmanĝo : ni rezervis la daton de la **17a de novembro** je la 12a horo . Informoj ĉe : 04 67 69 11 32 .

Eŭropa Tago de lingvoj (26an de septembro) : sekve de klopodoj, ni estis invititaj al tiu tago kaj ni prizorgis budon, bone vizititan de gelernantoj . Dankon al tiuj, kiuj venis por nin helpi ! Fine de la mateno estis planita debato inter lernejoj en salono Rabelais, sed ĝi ne vere okazis . Posttagmeze ĉiu ĉeestanta lernejo prezentis realigaĵon; laŭvice ni estis unu el la lastaj kaj rajtis nur du minutojn. Mikaelo Simon (liceo de Nîmes) prezentis sian retpaĝaron pri esperanto kaj T. Saladin sian asocion .

La kolegianoj
de La Grand Combe
aŭdis pri esperanto (punto)
(Midi Libre 20 X)

Afin de faire partager français bien sûr, allemands, roumains, écossais, "espérantistes", ainsi que des étudiants en Arabe classique.

Montpellier

Kursoj : Ili rekomenciĝis laŭ la jena horaro :

- UTT (Universitato de la tria tempo) : vendrede de la 9a ĝis la 12a horo (instruas Rosa Aumeunier k. Jeanne Bès)
- Ĉiesdomo Escoutaire : jaŭde (instruas S-roj Defoly kaj Martinez).

Esperanto, Culture et Progrès

Semajno de Sète :

De la 25a de Aŭgusto ĝis la 1a de Septembro okazis la 27a Internacia Semajno en "Le Lazaret" (familia feriejo en Sète).

En tre agrabla etoso, kvindek ĉeestantoj partoprenis tri malsamnivelajn kursojn, kies enhavo dependis de la interesoj de la ĉeestantoj. La tri niveloj estis gviditaj de Nina Korjnevskaja (komencantoj), Mario Guzzi (dua nivelo) kaj Pierre Babin (tria nivelo).

Dum liberaj posttagmezoj eblis ekskursi, bani sin en la apuda maro, kanti, viziti la tre riĉan libroservon, siesti en la parko...

Je la deksesa kaj duono la kursoj rekomenciĝis. Vespere la georganizantoj (Yvette Vierne, Jorgos, Nicolas Karatzaferis kaj Evelynne Banaszek) preparis ludojn, diverstemajn prelegojn, lumbildojn...

Homoj interesaj, etoso agrabla en ripozcentro tute taŭga, organizado bonega, tia estis la staĝo de Sète.

Do, se vi volas lerni Esperanton en tre bona kaj ĝoja etoso, ne hezitu, rilatu kun...

Esperanto - Culture et Progrès - 5, Rue du Docteur Roux 34090 Montpellier.

Vi certe ne bedaŭros.

Zohra, Vinko, Anne-Claire.

Réinsertion et Espéranto

Kadre de la Eŭropa Jaro de lingvoj, T. Saladin prelegis pri la mitoj kaj realo de la Eŭropa Unio koncerne lingvojn. "Réinsertion et E°" tenos sian ĝeneralan kunvenon je sabato la 20a de oktobro je 14h30, ĉe la sidejo de la asocio (26, Rue Enclos-Fermaud).

De la 1a ĝis la 4a de novembro R.E. organizas staĝon de E°-gramatiko, sub la gvidado de A. Cherpillod, membro de la Akademio de E°. Por informoj, bonvolu kontakti 04 67 75 62 98.

Niaj malĝojoj

En Aŭgusto forpasis en Montpellier post plurmonata malsano nur tridekjaraĝa Frédéric Durand. Li aktivis pli frue por Esperanto, speciale por la gastronomiaj semajnfinoj de Jefe. Al liaj familianoj kaj aparte al lia edzino Coralie, ni esprimas nian profundan kondolencon.

PERPIGNAN

Ĉisomere tri membroj de la grupo partoprenis en la UK de Zagreb. Vizitis la centron pluraj trapasantaj esperantistoj. Rete ni korespondas kun amikino, kiu loĝas apud la Nigra Maro kaj kiu lernas la francan lingvon pere de esperanto.

Okaze de la festivalo "Visa pour l'Image" (vizo por bildo) en septembro, la kultura centro ekspoziciis en sia montrofenestro diversajn fotojn. La ĉiutaga gazeto "Midi Libre" raportis pri la evento. Tiam S-ino Lay-My Jacqueline, esperantistino de la grupo de Dunkerque, ankaŭ ekspoziciis artajn fotojn pri "laŭlonge de Nilo", kadre de "festival off 2001", satelite de la internacia festivalo pri fotoĵurnalismo.

La Ĝenerala kunveno de la kultura centro okazis la 20an de septembro. Kiel lastjare disvolviĝos tri kursoj : -unuagrada kun C.Gérard-Voinçon; -duagrada kun Sro Joly; -perfektiga kurso kun Sro Bénazet.

Ni partoprenis en la "Festa des langues" la 6an de oktobro. Por tiu forumo de lingvoj estis reprezentitaj kvindek da lingvoj ! La gazetaro menciis nian budon.

(L'Indépendant 8 X)

RUE VIELLEDENT. "Nous sommes tous capables de parler une langue inconnue, sans passer par les méthodes d'apprentissage classiques", soutien Joëlle Cordesse, professeur d'anglais et présidente du GFEN 66 (groupement français pour l'éducation nouvelle). C'est sur ce principe pédagogique peu habituel, que le tout premier forum des langues a été créé, samedi, à Perpignan. "Babels est une fête pour célébrer la diversité des langages humains, mais aussi pour apprendre à la partager", a expliqué la présidente. Ce week-end, l'Arsenal s'est donc

transformé en véritable théâtre linguistique. Les visiteurs sont venus par centaines s'initier à des langues inconnues. Une façon ludique de découvrir le polyglotte qui se cache en chacun de nous.

Des langues qui se discutent. Entre exposition, ateliers et débats, tout est bon pour faire vivre les langues. Allemand, russe, portugais, turc, persan, roumain, ou encore créole et espéranto... plus de vingt langages différents étaient représentés, par des associations ou des particuliers. "Cela est très révélateur de la richesse culturelle du département. Il serait

dommage de ne pas en profiter", a fait remarquer Joëlle Cordesse. D'ailleurs les langues ne donnent pas seulement lieu à un enseignement. Elles suscitent aussi de grandes questions philosophiques. Chercheurs, écrivains, historiens, enseignants et linguistes sont venus en nombre pour ouvrir le débat, qui s'est achevé vers 21 h ! Pour clôturer ce premier forum, les intervenants ont partagé un repas convivial autour des cuisines du monde. Histoire de dire que les langues peuvent aussi se savourer.

Fabienne Pireddu

ĈE NIAJ NAJBAROJ

TULUZO

Sekve de la konata eksplodo tie, la radio-elsendejo FMR, kiu elsendis ankaŭ en esperanto, estis detruiĝinta. Du aliaj lokaj radiostacioj daŭre elsendas en la internacia lingvo.

Nova kompakt-disko en esperanto.

Vinilkosmo planas la eldonon de nova K-disko sed, ĉar la kosto estas pli granda ol kutime, via helpo estas bezonata. La titolo: "la landoj ekzistas ne"; la artisto: Morice Benin estas kantisto konata en Francio "pro dudeko da kompakt-diskoj kun progresemaj kanto-tekstoj, en kiuj li tenere pentras amantojn aŭ alvokas al frateco kontraŭ maljusteco". La nova K-disko prezentos dekduon da sukaj titoloj eliritaj el malnovaj kaj plej lastaj albumoj, tradukitaj de elstaraj esperantistoj.

Kiel subteni la projekton? Simple antaŭmendante la K-diskon, kiu aperos fine de la jaro aŭ komence de 2002. Mendo al Vinilkosmo 31450 Donneville (menciu ankaŭ vian retadreson kaj telefonnumeron)

Kosto: 13,50 Eŭroj. Sendkostoj: por 1 KD: 3,13 E; por 2 aŭ 3 KD: 4,42 E; por 4 ĝis 8 KD: 5,49 E.

Freŝaj informoj pri EKC

dank'al la surreta oktobra "Krokodilo"

La forumo de asocioj de la 6a de oktobro estis bonsukcesa.

M. kaj B. Robineau faris entute 5 prelegojn en Tuluzo kaj ĉirkaŭ Tuluzo.

La 23an de novembro estas planita **debato** kun Brian Moon kaj Christian Hen (Eŭropa movado) pri la temo: la Eŭropanoj bezonas komunan lingvon, sed kiun?

La Zamenhof-tago disvolviĝos dimanĉon la **16an de decembro** en Maison de Quartier Rangueil

19 Rue Claude Forbin - 31400 Toulouse ekde la 12a horo. Je tiu okazo oni povos aŭdi la arieĝan koruson tagmeze; post la tagmanĝo je la 15a horo, teatraĵo "la rekta metodo", ludota de la tuluza grupo kaj koncerto de Jomo. Ali A Tael ludos la iran sitaron. Rezervu la tagmanĝon (100F) al TEF 6, Rue G. Voisin 31130 Balma (Tel 05 61 24 14 45)

Printempe (de la 29a de marto ĝis la 5a de aprilo) okazos la **18a PSI** (printempa semajno internacia) en regiono Pfalz (sudokcidente de Germanio, proksime de Francio) en Waldfishbach-Burgalben. Temo: Multaj kulturoj - unu ideo; multaj ideoj - unu kulturo. La seminario enhavas kaj laborajn kaj distrajn elementojn por ĉiuj aĝoj (aliĝilo haveblas de SFS). Oni atendas pli ol 160 partoprenantojn el 15 landoj. EKC proponas **grupojaĝon** al tiu aranĝo (kontakto telefone aŭ fakse EKC 05.61.25.55.77) aŭ rete <toulouse@esperanto.org>



PROVENC

X La Provenca federacio invitas vin al **Kultura Semajnfino en Aix-en-Provence** (Centre de la Baume-Chemin de la Blaque) **la 24an kaj 25an de novembro**.

Programo: sabaton posttagmeze ekde la 14a horo: diversaj kursoj; studo de "Amo kaj morto en Balio" de Vicki Baum (nur la antaŭparolo). Je la 19a: vespermanĝo kaj distraĵoj.

dimanĉon: je la 9a matenmanĝo, poste kursoj, konversacioj, tagmanĝo.

Prezo por la tuta restado: en individua ĉambro: 300F; en duobla ĉambro: 250 F; sola manĝo: 100F; sola partopreno: 50 F.

Aliĝilo sendota antaŭ la 30a de oktobro al Esperanto, 15 Rue Ricord Laty, 06400 Cannes (Tel: 0493437580)

KATALUNIO

Pli ol cent personoj aliĝis la 30an katalunan kaj 3an transpirenean kongreson de esperanto en Girona (12-14 X); proksimume la duono partoprenis, inter kiuj dekduo el Tuluzo... kaj nur duono el nia federacio! Bedaŭrinde, ĉar la etoso estas ĉiam amika, oni ne krokodilas kaj la loko estas facile atingebla per aŭtoŝoseo. La kongrestemo estis "migrado kaj lingvoj" kun spertoj kaj ne nur teorioj de diversaj esperantistoj: István Ertl (Hungaro, redaktoro de "Esperanto" en Rotterdam), Yenok Lazian (Armeno, kiu vivas nun en Parizo post longa migrado), Ruben Fernandez (juna Kataluno, kiu rakontis pri sia unujara sperto en Koreio). Ankaŭ menciindas kontribuoj de la angla poeto Kris Long, ateliero pri tradiciaj dancoj, koncerto de Georgo Handzlik (Pollando - "la bardo sen barbo"), mimiko de Flavie Audibert kaj teatraĵo "La rekta metodo" fare de 7-homa trupo el Tuluzo, vizito de la interesa urbo-centro, bankedo kun tre bongustaj pladoj. Ĉu vi ne bedaŭras, ke vi ne venis?

La venonta Kataluna Kongreso okazos en Sollers (Majorko) komence de Novembro 2002.

La dua KAFE (kultura kaj arta festivalo de esperanto) estas antaŭvidita dum somero 2002 kaj oni ankaŭ parolis pri Forumo de Kulturoj en Barcelono en 2004.

Nouveau livre :

Langues sans frontières

A la découverte des langues de l'Europe

de Georges Kersaudy -Editions Autrement / Collection Autrement/Frontières -149F -

Ancien fonctionnaire international, G. Kersaudy parle, écrit et traduit une cinquantaine de langues d'Europe et d'Asie. Son livre est dédié "Al la multlingvaj gestudentoj de la tria jarmilo / Aux étudiants polyglottes du troisième millénaire". Il se compose de trois parties : a) faits méconnus, idées reçues, aspects nouveaux b) problèmes et solutions, méthodes d'apprentissage c) vocabulaires parallèles de 39 langues d'Europe.

Dans la partie problèmes linguistiques de l'Europe et leurs solutions figure la solution de la langue internationale (internacia lingvo = ilo) dont vous trouverez ci-après un large extrait et, sur 6 pages, un condensé de la langue ("L'Esperanto en une heure").

Enfin un livre qui traite de l'espéranto avec objectivité ! Peut-être pourriez vous en prévoir l'achat pour vous-même, l'offrir à un ami, recommander son acquisition à votre libraire ou bibliothèque de quartier ...

Pour ceux qui le connaissent et le pratiquent, l'ILO représente la synthèse parfaite des langues de l'Europe moderne ; mais comme on pouvait le prévoir, l'Esperanto n'a pas que des partisans et, parmi ceux qui ne le connaissent pas, il s'en est trouvé un certain nombre pour avancer à son égard diverses critiques.

On constatera avec intérêt qu'il n'est nullement nécessaire de réfuter ces critiques : Il suffit de les confronter et de les comparer pour qu'elles s'annulent mutuellement : pour certains, la langue internationale diffère trop du latin; pour d'autres le nombre des racines latines y est trop élevé ; elle ne ressemble pas assez à l'anglais; ou encore elle ressemble trop aux langues latines, etc. Même les linguistes, qui, dans l'ensemble ont bien compris l'intérêt de l'Esperanto, n'ont pas manqué de lui faire des reproches assez inattendus, et notamment celui d'être trop facile ! On est allé jusqu'à critiquer le fait que les règles de grammaire ne sont pas soumises à des exceptions ; et certains souhaitent qu'on y introduise des irrégularités, pour rendre la langue plus proche des langues nationales européennes !

Pour ceux qui pratiquent couramment la langue internationale, son écrasante supériorité ne saurait être mise en doute ; on peut dire que l'Esperanto réunit toutes les qualités des langues d'Europe, et qu'il est en quelque sorte l'héritier de l'ensemble de la civilisation européenne. En effet, l'Esperanto n'est rien d'autre qu'un compromis entre les principales langues de l'Europe ; Zamenhof a pris pour base les mots « internationaux » communs aux grandes langues européennes de civilisation ; il en a tiré des racines déjà connues de tous les Européens, ou du plus grand nombre d'entre eux, et les a ensuite incorporées dans un système de reconstruction simple et logique. Quant à la grammaire, c'est un chef-d'oeuvre de logique et de simplicité.

Avantages sur les autres langues

À ce jour, environ dix millions de personnes dans le monde entier ont appris l'Esperanto. La langue fonctionne et est depuis longtemps prête à servir dans les relations internationales ; elle possède une abondante littérature originale, et de plus, le nombre des ouvrages traduits en Esperanto atteint des dizaines de milliers de titres ; on trouve aujourd'hui des Espérantistes actifs dans 119 pays du globe, et il existe des associations espérantistes dans 99 pays. Des émissions de radio en Esperanto sont diffusées à partir de Pékin, du Vatican, de Rome (RAI), de Varsovie, de Vienne, de Tallinn, de Séoul...

Depuis plus d'une centaine d'années, les Espérantistes n'ont jamais cessé de cultiver « leur » langue, en dépit de l'incompréhension – et parfois de l'hostilité – des autorités officielles des divers pays d'Europe ; on en était même arrivé, dans certains milieux, à les considérer comme une sorte de secte ou, dans le meilleur des cas, comme de doux maniaques.

Chaque année, depuis plus de cent ans, les congrès d'Espérantistes proclament à la face du monde l'existence bien réelle de la langue internationale, et refont inlassablement la démonstration de sa vigueur et de son efficacité ; on y fait le point des progrès accomplis dans tous les domaines, on y présente des publications de plus en plus nombreuses et variées rédigées dans la langue internationale. On peut même y rencontrer des centaines de personnes, des enfants et des adultes, dont l'Esperanto est la langue maternelle ; ce qui ne les empêche pas, bien au contraire, de parler de nombreuses autres langues. Il est en effet prouvé depuis longtemps déjà que celui qui a appris la langue internationale est à même d'apprendre beaucoup plus rapidement et facilement n'importe quelle langue européenne. De nombreux Chinois, Japonais et Coréens en ont fait l'expérience ; et on ne compte plus les Espérantistes européens qui se sont servis de « leur » langue pour apprendre en un temps record un grand nombre de langues étrangères, européennes ou autres. Même les débutants dans la langue internationale constatent très vite qu'un texte traduit en Esperanto à partir d'une langue étrangère a pour eux la valeur d'une explication de texte, tant il permet de reproduire fidèlement le texte original dans ses moindres nuances.

En dehors des milieux espérantistes, tout cela passait généralement inaperçu jusqu'à ces derniers temps ; les pouvoirs publics de la plupart des grands pays d'Europe restaient étrangement sourds et aveugles devant un phénomène qui doit inévitablement apporter un jour la solution de leurs problèmes linguistiques. C'est seulement maintenant, à la 23^e heure, qu'on commence à prendre conscience de cette réalité...

La valeur de l'Esperanto en tant qu'outil de communication internationale a été reconnue par l'Unesco, qui a décidé en 1984 de s'en servir dans le domaine des échanges scientifiques. Inévitablement, la langue internationale finira par s'imposer dans les institutions européennes ; les procédures de travail dans tous les domaines de l'organisation interne s'en trouveront énormément simplifiées. Chaque fonctionnaire aura la possibilité de rédiger dans sa langue nationale ou directement en langue internationale. L'Esperanto (l'ILO) s'imposera un jour comme unique langue de travail et permettra de résoudre une infinité de problèmes ; on peut prévoir dès maintenant que la traduction des documents définitifs vers toutes les langues officielles se fera à partir d'un texte de référence unique, rédigé en langue internationale. Dans tous les cas, l'usage de la langue internationale constituera le plus sûr garant de l'égalité parfaite entre les langues officielles.

Nous avons souvent entendu des professionnels de la traduction et de l'interprétation exprimer des craintes à l'égard de l'intrusion inévitable de l'ILO dans les relations internationales ; c'est un peu comme si les médecins s'inquiétaient des progrès de la virologie : même l'apparition d'un anti-virus universel ne les réduirait pas pour autant au chômage...

La langue internationale aura un effet multiplicateur sur les relations entre tous les pays du monde. D'ici quelques années, des dizaines de millions d'ordinateurs européens vont converser entre eux dans une cinquantaine de langues ; il est dès à présent certain que la langue internationale viendra mettre un peu d'ordre dans cette extraordinaire cacophonie, mais il y aura encore de beaux jours pour les traducteurs et les interprètes, et leur nombre ne fera que croître dans des proportions actuellement insoupçonnées, pendant quelques décennies au moins...



UNIVERSALA KONGRESO DE ZAGREB (KROATIO)

DU NOVAJ UK-ANOJ RAKONTAS...


Estis la unua fojo, kiam ni partoprenis UK-on . La UK okazis en Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio . Ni loĝis en studenta hejmo, kie ankaŭ loĝis aliaj kongresanoj el nia federacio, malproksime de la kongresejoj . Jes, estis du kongresejoj, sufiĉe proksimaj unu de la alia . Se la kongresejoj estis iom fore de la centra urbo, feliĉe la tramoj kaj busoj estis, dank'al la organizantoj, senpagaj por la esperantistoj . La vivo en la kongresejoj estis agrabla, oni povis trinki kaj manĝi surloke .

Kelkfoje estis malfacile elekti prelegojn el la multaj proponitaj . Ofte la prelegoj estis vere interesaj kaj cerbumigaj . Jes ja, ni aŭdis malsamajn akcentojn (anglan, azian, slavan kaj francan) sed tamen ni bone inter-komunikis . Ni bedaŭris, ke ne okazis pli multe da prelegoj pri la nuna Kroatio, sed eble estis nek la loko nek la momento .

Dum la malferma ceremonio, la kroata Prezidento oratoris kaj konkludis en esperanto; tio multe plaĉis al la geesperantistoj . Okazis distraj vesperoj . La bonveniga vespero, animita de lokaj tradiciaj dancistoj kaj muzikistoj, ebligis al la kongresanoj sin trovi . Esperanta balo, plenaere sur la ĉefplaco de Zagrebo, permesis renkontojn inter kongresanoj kaj zagrebanoj . Ni ĉeestis ankaŭ la nacian vesperon, teatraĵojn, koncertojn . Monumento de Jesper Nergaard pri Esperanto estis inaŭgurita . Dum la merkreda ferio, kiam la plejparto ekskursis, ni piede vizitis la urbon . Dum la vizitado ni renkontis tie kaj tie esperantistojn, kun kiuj ni babiladis . Post la kongreso, ni planis revenon rekte laŭ la marbordo, sed oni konsilis al ni viziti Plitvice, la lagan regionon . Feliĉe ni sekvis la konsilon, ĉar la vidaĵoj estas mirindaj . Kiam ni vizitis Pula (romania urbo), tio tro memorigis al ni nian Nimon...do ni tuj hejmeniris .

Venontan jaron ni ne elektos la vojaĝon al la UK de Fortaleza (Brazilo), sed eble ni iros al Verona (Italio), kie okazos la eŭropa kongreso . Eble ni nin vidos tie .

Evelyne kaj Nikolao



Akvofaloj en Plitvice; komparu kun la homoj maldekstre .

MALNOVA UK-ANO RAKONTAS...

Post komparo de la transport-rimedo mi decidis iri al la UK... per buso. La vojaĝo komenciĝis frumatene en la Cevena trajno al Nimo. Tie mi atendis la buson, kiu venis el suda Portugalio . Perbuse ("Eurolines" aŭ "Intercars") eblas vojaĝi al Turkio, Maroko, Finnlando, Svedio, Irlando, Rusio... La buso estis plena, mi sidiĝis hazarde apud samideaninon, ne renkontitan de pli ol 20 jaroj ! Post 24 horoj, traveturinte Italion kaj Slovenion, ni alvenis en Zagrebo, kie atendis nin LKK-anoj kaj amiko, kiu kondukis nin al niaj loĝejoj . Evidentiĝis poste, ke nia regiono estis bone reprezentita : 3 personoj el Perpignan, 1 el Montpellier, 2 el Gard, 1 el Lozère, Ges. Roget (pli frue en Béziers), 1 el Aude, registrita sub la landnomo Kubo. Partoprenis la UK 1700 homoj, sed laŭdire oni atendis plian milon . La militaj eventoj en eks-Jugoslavio lasis spurojn...

Kompare kun la Zagrebo de antaŭ 20 jaroj, kompreneble la urbo evoluis kaj nun rapide modernigis . Mi ne multe vizitis ĝin, ĉar plejparte mi iris al la UK por plenŝtopi miajn orelojn per E^o-sonoj . Estas ĉiam la sama miraklo alparoli homojn el diversaj nacioj, etnoj, preteratentante de kie ili devenas . Prelegoj, kunvenoj, spektakloj, kiel kutime, sed ankaŭ vagado tra la ampleksa libroservo (mi rimarkis inter aliaj la libron de Daniel Moirand, nia najbaro de Provenco, pri la vojaĝo de Marko Polo kaj la nigran kolekton "Mondoj" de G. Handzlik kun ĉijara rikolto de 34 rakontoj de 30 verkistoj el 5 kontinentoj) . La nacia vespero estis altkvalita . Fine de la internacia vespero, la Brazilanoj, kiuj invitis al la UK de Fortaleza, disdonis pajoĉapelojn kaj kiam la disdonado estis finita, ne plu funkciis la tramoj kaj busoj (senpagaj por la kongresanoj) !

Menciindas la vizito de la Prezidento de Kroatio por la malfermo de la UK, la infankongreseto (infanoj el 15 landoj), speciala poŝtmarko (ankaŭ monbileto), inaŭguro de monumento, balo sur la centra placo, ktp, ne forgesante la temon de la UK : la kulturo de dialogoj, la dialogo de kulturoj . Tiu temo estas plej aktuala, ĉu ne ? Dum la kongresa semajno mi renkontis gesamideanojn, kiuj menciis aŭ memorigis la UK de Montpellier kaj la postkongreson, junan instruiston el Dominika Respubliko (ĉu la unua esperantisto tie ?), kiu malkovris E-on surrete, Roger Imbert, la aŭtoron de lernolibroj de E°, kiu provis antaŭ kelkaj jaroj instrui la internacian lingvon en nia regiono... kaj multnombrajn gefrancojn (partoprenis 200, la plej ampleksa grupo !).

Por la tuttaga ekskurso mi elektis Plitvice kaj vere la loko estas mirinda pro la bluaj lagoj ("Monato" priskribis ilin en sia junia numero), eĉ se la nombro da vizitantoj somere iom ĝenas kaj foje malpermesas halti ! Pri tiu juvelo kaj pri la UK kaj Zagrebo, mi revenis, same kiel la du ĉi-supraj UK-anoj, kun lumbildoj, kiujn ni volonte montros al grupoj, kiuj tion petos de ni .

Ĉar mia buso (al Parizo tra Aŭstrio kaj Germanio) foriris sabaton matene, mi ne povis ĉeesti la oficialan fermon de la UK . Tiam estis anoncitaj demisioj ĉe UEA . Espereble la krizo solviĝos baldaŭ...

Jean Hénin

ILI DIRIS...

.../... En la moderna mondo, en kiu la bazaj civilizaciaj determiniloj estas la egaleco kaj egalrajteco de ĉiuj popoloj, Esperanto ebligas samajn kaj egalajn fundamentajn kondiĉojn por dialogo . Per flegado kaj konservado de etnaj lingvoj, sen distingo inter la grandaj kaj malgrandaj, la esperantistoj realigas komunikan demokration kaj malfermas eblecojn por inter-konigo de la kulturoj . Al tio sendube kontribuos ankaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo .

Tial, al ĉiuj kongresanoj mi deziras multan sukceson en ilia laboro kaj precipe al la gastoj el aliaj landoj agrablan restadon en nia hejmlandoj .

Stjepan Mesić
Prezidento de Respubliko Kroatio
Alta Protektanto de la Kongreso



Estas por mi plezuro transdoni miajn bondezirojn al la 86-a Universala Kongreso de Esperanto. La Esperanto-movado ĉiam partoprenis la celon interligi homojn trans naciaj limoj.

Hodiaŭ ni vivas en nova epoko de komunikado, en kiu eblas transsendi informojn pli rapide kaj pli foren ol iam ajn antaŭe. Tamen unu homo el du neniam faris aŭ ricevis telefonvokon. Larĝa diĝita disdivido forbaras multajn malriĉajn landojn de la rimedoj de informteknologio. Unuiĝintaj Nacioj, kunlabore kun la civila socio kaj la privata sektoro, havas firman volon transponti tiun dividon.

Inter la novaj iniciatoj, pri kiuj mi esperas ke ili konstruos diĝitajn pontojn al la evolu-landoj, estas la Teknologia Servo de UN, UNiTeS. Tiu norda reto de voluntuloj dividas sian scipovon kun grupo en sudaj landoj, donante trejnadon pri la aplikado de teknologio. Pliibonigita komunikado havigas multajn avantaĝojn: por distanca lernado, pli rendimenta negocado kaj pli rapida reago al urĝaj okazajoj. Dividante la neelĉerpeblan varon informado ni povas pliibonigi ĉies aliron al edukado, sano kaj prospero.

Dum ni alstrebas niajn komunajn celojn de pliibonigitaj komunikado kaj komprenado, mi antaŭĝojas pri pluj kunlaboro kaj bonvolo inter UN kaj la E-movado. En tiu spirito mi deziras al vi plenan sukceson.

Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN

(La lasta frazo de la cetera anglalingva mesaĝo estis skribita en E-o.)

* Nobel-pacpremio por 2001



Estas mia plezuro transdoni miajn bondezirojn al la partoprenantoj de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo (Kroatio) pri la temo "Kulturo de Dialogo – Dialogo inter Kulturoj".

Unesko aparte zorgas pri tiu ĉi temo: unue, rilate sian mandaton antaŭenigi kulturon de paco, kaj, due kaj pli aktuale en la nuna jaro, en la kadro de la jaro de Unuiĝintaj Nacioj pri Dialogo inter Civilizoj. La fakto ke la Universala Kongreso de Esperanto sin dediĉas al tiu ĉi jaro de Unuiĝintaj Nacioj estas aparte signifa al Unesko. Neregistaraj organizaĵoj kiel la via ludas gravan rolon en antaŭenigo de la celoj kaj strebadoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj Unesko alte taksas siajn jam longdaŭrajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio.

Lingvoj kaj lingva diverseco konsistigas la ŝlosilon al interkultura dialogo. Ĉar estas la lingvo mem kiu esprimas la komunan historion de kulturo kaj ebligas al ĝiaj membroj komunikigi inter si. Je sama tempo, estas la lingvo kiu povigas kulturojn intersangi ideojn kaj prunti kaj adaptigi inter si. Same, estas la lingvo kiu permesas al ni komune dividi niajn ideojn pri la mondo sur tereno de kultura diverseco, kaj malsami dum ni samtempe festas nian komunan homecon. Fine estas per parolado kaj aŭskultado unu al alia ke ni atingas komprenigon, tiel esencan al paca kunezisto.

La laboro de Unesko en edukado, komunikado kaj kulturo daŭre emfazas la gravecon de multlingvismo kaj de konservado de lingva diverseco sur la tutmondiĝanta tergloblo. Tamen, ni rekonas ke tia diverseco neniam estu uzata kiel preteksto por perforto aŭ konflikto. Jen nia defio. Ni komune dividas tiun defion kun niaj kunlaborantoj tra la mondo, kiel ekzemple vi, kiuj dediĉis vin al la celoj de la Dialogo inter Civilizoj.

En tiu ĉi kadro, ni alte taksas la laboron de la Universala Kongreso de Esperanto, ĉar vi antaŭenigas lingvon kiu estas ilo de dialogo inter civilizoj, kiu ne fiksas siajn radikojn en la kulturo aŭ intelekta tradicio de difinita grupo de nacioj.

Mi deziras al la kongreso ĉian sukceson.

John Daniel, Asista Ĝenerala Direktoro por Edukado

Pri Kroatio, el turisma dokumento :

ĜENERALAJ KAJ GEOGRAFIAJ INFORMOJ:

Areo: 56.542 km²

Mara areo: 31.067 km²

Loĝantoj: 4.500.000

Ĉefa urbo: Zagreb, 900.000 loĝantoj

Marborda longeco: 5.835 km, el kio 4.058 km estas la bordo de insuloj, insuletoj kaj rifoj

Nombro de insuloj, insuletoj kaj rifoj: 1.185 - el kio 67 loĝataj insuloj; la plej grandaj estas Krk kaj Cres

La plej alta pinto: Dinara 1.831 m

Klimato: interne de la lando modere kontinenta kun varmaj kaj sekaj someroj kaj malvarmaj, kaj malsekaj vintroj

-montara regiono: freŝaj someroj kaj severaj vintroj kun abundo da neĝo

-marbordo: mediteranea klimato, kun varmaj kaj sekaj someroj, kaj mildaj, sed malsekaj vintroj

-averaĝa temperaturo januare: interne -1 ĝis 3°C; montare -5 ĝis 0°C; marborde 5 ĝis 10°C

-averaĝa temperaturo aŭguste: interne 22 ĝis 26°C; montare 15 ĝis 20°C; marborde 26 ĝis 30°C

Nacia strukturo: kroata plimulto, minoritatoj: serboj, mahometanoj, slovenoj, italoj, ĉeĥoj...

Religio: romkatolikoj, minoritate ortodoksanoj kaj aliaj kristanoj, kaj iom da mahometanoj

Oficiala lingvo: la kroata; latina alfabeto

MALLONGE :**NOVA ESTRARO DE UEA :**

Estis elektitaj en Zagrebo Renato Corsetti (prezidanto), Lee Chong-Yeong kaj Humphrey Tonkin (viceprezidantoj), Ivo Osibov (ĝenerala sekretario), Ans Bakker (financoj), Gbeglo Koffi (edukado, kulturo), Andrej Grigorjevski (informado) kaj Michela Lipari (landa agado) .

MALDUNGOJ :

Sekve de tiu elekto estis anoncitaj tri demisioj : Osmo Buller (ĝenerala direktoro de UEA), Pasquale Zappelli (direktoro de la centra oficejo), Istvan Ertl (redaktoro de "Esperanto") . Se oni aldonas du pensiigojn, evidentiĝas ia krizo .

NOVA LABOR-PLANO :

La nova labor-plano de UEA emfazas la jenajn prioritatojn : informado, instruado, utiligado, plijuniĝo, tutmondiĝo, profesiiĝo .

NOVAJ MEMBROJ :

Aliĝis al la UEA-familio plia landa asocio : Benina E-federacio (la 5a en Afriko kaj la 63a entute) . Estis akceptitaj kiel kunlaborantaj asocioj (40 nun) Astronomia E-klubo kaj Monda Yumeiho-Societo .

REZOLUCIO DE LA UK :

*La 86a Universala Kongreso de Esperanto...
-rimarkigas, ke efika dialogo inter diversaj kulturoj sur lingve demokratia bazo postulas prikonsideron de la bezono de nova internacia lingva ordo;
-apelacias al ĉiuj parolantoj de E°, ĉiuj lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj E-organizaĵoj, kaj ĉiuj kiuj subtenas la celojn de E°, kunlabori en la daŭra konservado kaj plifortigo de la dialoga kulturo, kiun prezentas E°, kaj daŭre partopreni en la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko krei dialogon inter la civilizoj je tutmonda skalo, kiu estas tiel esenca por la paca evoluigo de la homa socio .*

DISTINGAĴOJ :

La premio Onisaburo Deguĉi (monsumo) estis aljuĝita al KSM (Koresponda Servo Monskala)"pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo". Gratulojn al la respondeculo F-X. Gilbert en Longeville en Barrois .
Nia amiko Raymond Boré ricevis konfirmon de O. Buller, ke la estraro de UEA konfirmis lian nomumon kiel komisiito de UEA pri Zamenhof/E°-objektoj kaj ke tiel li daŭrigos la laboron de Sro Röllinger . Gratulojn al la nova respondeculo !

**VENONTAJ UK :**

Post Fortaleza (Brazilo) en 2002 kaj Göteborg (Svedio) en 2003, UEA baldaŭ decidis por 2004 inter Pekino (Ĉinio) kaj Vilnius (Litovio). O. Buller jam vizitis la du urbojn, li estis akceptita de ŝtataj eminentuloj (en Litovio de la prezidento de la respubliko) kaj konstatis, ke en ambaŭ urboj ekzistas bonaj kondiĉoj por okazigi UK . Do, malfacila elekto . Ĉu, pro tio ke Vilnius estas tro proksima de Göteborg, Pekino estas elektota ?

UK 2005 EN FRANCO ?

La unua UK de esperanto okazis en Boulogne sur Mer en 1905 . Por la centjariĝo de la evento estis proponite okazigi la UK en Bulonjo sed, pro diversaj kialoj (nesufiĉa kongresejo, manko de lokaj fortoj, ktp) oni rezignis pri la projekto kaj anstataŭe UFE proponas al UEA la kandidatiĝon de Lille kun la kunlaboro de la lokaj E-asocio kaj federacio .

GEJUNULOJ KONGRESAS :

De la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto kunvenis preskaŭ 400 gejunuloj el 35 landoj okaze de la kongreso de Tejo en Strasbourg . La elektita temo estis : plurlingvismo en Eŭropo, kiel sukcesigi ĝin ? Aldone al riĉa programo, interesaj prelegoj, vizitoj al la Eŭropa Parlamentejo kaj al la Konsilio de Eŭropo, ekskursoj al Elzaco kaj Germanio, vesperoj/noktoj en la diskoteko kaj gufujo, la festivalo "Artoj kaj lingvoj" ebligis al la strasburga publiko malkovri tridekon da lingvoj de la mondo, inter kiuj esperanto .

HP

Hrvatska pošta

**EŬROP-UNIA KONGRESO :**

Post kongresoj en Verona (92), Parizo (95), Stuttgart (97), Oostende (2000), Verona denove invitas vin de la 23a ĝis 28a de aŭgusto 2002 .
Temo : efektiva lingva egaleco , rajto de la Eŭropanoj . La dua aliĝperiodo validas ĝis la fino de decembro (aliĝiloj haveblas ĉe UFE aŭ SFS) .
Tarifo : 70 Eŭroj (kategorio 1 : ordinara) aŭ 35 (kategorio 2 : reduktita por junulo, kunulo, handi-kapulo) . Organizanto : Verona E°-grupo CP1616, IT - 37100 Verona, Italio esperantoverona@adriacom.it

FRATERNIPHONIE

Extrait du journal "Fraterniphonie" :
"La Fraterniphonie se bat pour la défense de la langue française : la loi Toubon n'est pas appliquée, il n'y a aucune volonté politique pour faire gagner le français, à l'image de nos dirigeants qui, dans les différentes activités, ne sont pas capables de faire respecter notre langue comme pourtant l'article 2 de notre constitution les y oblige. Les médias occultent allègrement la défense de notre langue. L'intégration européenne et la mondialisation de l'économie participent à l'anglicisation générale. Est-il normal d'adopter la langue des Américains alors qu'une des raisons principales de faire l'Europe était d'assurer notre indépendance tant à l'est qu'à l'ouest ? Adopter la langue d'une puissance hégémonique ne témoigne pas d'une envie d'indépendance..."

Bref, c'est le français qu'on assassine et l'Europe qu'on américanise. Le programme secret de l'Europe : l'anglicisation". A cela H. Masson ajoute, dans un article publié dans ce même journal : "Que de temps serait pourtant gagné dans la construction d'une Europe à visage humain si, non seulement les europarlementaires, mais surtout les citoyens, pouvaient bien se comprendre dans une langue qui ne serait pas celle d'une tierce puissance".

Mado Vidal

Fraterniphonie A.F.R.A.V. -Parc Louis Riel- 2811
chemin de Saint Paul - 30129 Manduel

Retadreso : afravfr@aol.com

Aliĝo al la asocio : 50 F aŭ pli

Abono al la bulteno : 100F (50F por la membroj)

Courrier des lecteurs

"Politis" n° 664 du 30/08/01

(transmis par Lucien Angevin)

Précisions sur l'Espéranto

De retour du 86^e congrès mondial d'Espéranto de Zagreb où 1 600 délégués de plus de 65 pays ont vécu une semaine exaltante autour du thème « Dialogue des cultures, culture de dialogues », je lis avec quelque étonnement quelques expressions de votre court article du 26 juillet, titré « Espéranto chinois ».

[...]
L'esprit de l'Espéranto reste effectivement bien vivant car non seulement c'est « une langue très bien faite » comme l'a souligné Umberto Eco mais aussi une langue riche de son humanisme commun à tous les hommes de bonne volonté, et si ses progrès n'ont pas été aussi rapides que certains l'auraient espéré, « ce n'est pas, de toute évidence, pour des raisons linguistiques mais pour des raisons politiques ». Les applications de l'Espéranto dans tous les domaines de l'intelligence, de la pensée et du sentiment, suffisent pour montrer, à ceux qui veulent bien l'examiner objectivement, qu'il n'est plus « une belle utopie » mais que malgré le silence de la grande presse, malgré les

préjugés sans fondements, malgré les persécutions de régimes peu soucieux d'une vraie communication entre les hommes « de base », il est devenu une réalité bien vivante qui permet cette véritable communication entre les hommes, laquelle est bien différente de la pseudo-communication du sabir anglo-américain des aéroports. Son essor sur internet au cours des dernières années peut être vérifié par tout un chacun en consultant le site : <http://www.esperanto.net>.

Mais peut-être faut-il préciser une nouvelle fois que l'Espéranto n'a jamais eu pour but d'être une langue unique, il a toujours été clairement défini comme une langue commune, étudiée à côté de la langue nationale de chacun. [...] Il n'a donc rien à voir avec cet anglo-américain dont on voudrait nous faire croire, contre toute vérité objective, qu'il est devenu la langue internationale. En dehors de certains milieux très limités cette « universalité » de l'anglais est une illusion que tout voyageur parlant vraiment anglais peut vérifier. Même sur Internet l'anglais est passé de 85 % du trafic à 45 %, et cette tendance continuera de s'affirmer au

fur et à mesure du développement de l'Asie et de l'Amérique du Sud. Les sources anglaises objectives (voir internet) montrent que le nombre des locuteurs de l'anglais vient après les locuteurs du Mandarin et de l'Espagnol.

Le monde espérantophone, sans moyens financiers, a réussi à se développer sur tous les continents, les écrivains ont élaboré une culture matérialisée par des bibliothèques comportant de 30 000 à 40 000 titres. L'enseignement de sa langue se fait dans plus de 120 universités ou établissements supérieurs. L'un des membres de l'une des 2 académies internationales des sciences utilisant l'Espéranto comme langue de travail [a été récompensé] par un Prix Nobel d'Économie, et l'ancien président de son Akademio de Esperanto, l'Écossais William Auld, est pour la seconde fois proposé comme candidat au Nobel de Littérature pour son œuvre abondante et variée en Espéranto.

MAURICE SUJET,

PRINCIPAL HONORAIRE DE COLLÈGE,
JOUY-SUR-MORIN (SEINE-ET-MARNE).

L'ANGLAIS AU PARLEMENT EUROPÉEN

"Bien qu'aucun n'ose le dire, les textes sur lesquels tranchent doctement les nobles élus ne sont compréhensibles qu'à proportion de 30 à 50% Pour ce qui est des réunions informelles non traduites, le taux est souvent plus faible encore... Quand la présidente (française) adresse aux députés une invitation pour quelque cérémonie de la Journée de l'Europe, les cartons sont en anglais... Exige-t-on des traductions en français des textes en discussion ? On vous promet une traduction, qui arrive souvent plusieurs jours après la date limite de dépôt des amendements".

Extrait d'un article paru dans "Valeurs actuelles" du 24 août sous la plume de Paul-Marie Coûteaux, lui-même parlementaire européen...

INTERNET

D'après les statistiques de <http://glreach.com/globstats> d'octobre 2001, la proportion d'internautes anglophones est maintenant de 43% (51% il y a un an, 45% en juillet). Cette proportion pourrait tomber à 35% en 2005.

RADIO VIENNE

Les programmes en espéranto de cette station pourront prochainement être écoutés sur ondes moyennes (1470 Khz) le vendredi à 20 h (heure européenne), d'où une écoute améliorée.

Les crédits de fonctionnement de cette radio ont été fortement réduits. Bien que la rédaction reçoive une majorité de correspondance en E° (16728 lettres en espéranto en 2000, contre 9427 en allemand, 3239 en anglais, 1523 en français), il est question de limiter les émissions à l'anglais et au français... Des messages de soutien peuvent être envoyés à l'ORF roi.internet@orf.at

DISTRA PAĜO KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	
Solvej de la 157-a	I	P	R	O	T	E	S	T	A	N	T
	II	R	E	Z	I	G	N	A	C	I	E
	III	O	P	E	R	O		R	I	T	M
	IV	T	E	N	I		K	A	N	O	P
	V	E	R	O		V	I	N		N	E
	VI	K	T		A	O	R	T	O		R
	VII	T	U	R	B	U	L	E	N	T	A
	VIII	I	A	M	A		I	L	I		T
	IX	S	R		T	U	T		S	K	U
	X	M	A	D	A	G	A	S	K	A	R

HORIZONTALALE

- I) - Ĝentilaĵ(o).
- II) - Lirike / Melodie.
- III) - r : Militu, ne amoru !
- IV) - Malsekokula / Alfa de ipsilono.
- V) - Fikcie.
- VI) - Antaŭen ! / Flor(o).
- VII) - Nepra.
- VIII) - s : Poemo / Vestopart(o) mallongigita.
- IX) - Tekster(o) / Maskita urs(o).
- X) - Por vomo / Fondint(o).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I										
II				■		■				
III										
IV							■			
V		■								
VI				■					■	
VII										
VIII			■							
IX		■					■			
X						■				

VERTIKALE

- 1) - 21-a preĝ(o).
- 2) - Virina nom(o) / s : Meblo.
- 3) - Kukurbac(o) / Ekkrio.
- 4) - Gerila organiz(o) / Mismoke.
- 5) - Pluraj abocoj ?
- 6) - Flor(o).
- 7) - Pastri.
- 8) - Lag(o) / Litero.
- 9) - Returnita aminoacid(o) / Malnudigil(o).
- 10) - Kuraca zorg(o).

BOPARO

IOM DA MATEMATIKO :

ĈE LA BAKISTO

Kiam mi aĉetas 2 buterbulkojn kaj 1 lunarkon, tio kostas al mi 20 Frankojn .
Kiam mi aĉetas 1 buterbulkon kaj 2 lunarkojn, tio kostas al mi 22 Frankojn .
Hodiaŭ mi aĉetis nur 1 buterbulkon kaj 1 lunarkon . Kiom mi devos pagi ?

TGV (rapidtrajno)

Mi veturas de Parizo al Liono per TGV . Mi sidas apud la fenestro . Kiam alia simila TGV renkontas nin, tio daŭras 2 sekundojn kaj duonon . Ĉiu TGV longas 278 metrojn . Je kioma rapideco ni ruliĝas ?

GEOGRAFIO

La loĝantaro de la riĉaj landoj reprezentas 24% de la monda loĝantaro kaj konsumas 82% de la mondaj riĉaĵoj .
Kiom da loĝantoj de la malriĉaj landoj estas necesaj por konsumi tiom kiom unu loĝanto de riĉa lando ?

La venonta FF Saperos komence de Januaro 2002 . Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 27a de decembro al
Jean Henin, Beauregard, Route de Montcayrroux 48500 La Canourgue , telefono/telekopio 04 66 32 86 36
Retadreso : Jean.Henin@wanadoo.fr .

Anticipajn dankojn !

